

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj: la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 2, N-ro 2 (8): julio-aŭgusto 2009

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter.doumen@adsl4you.be

Redaktore...

Karaj Legantoj,

*Denove vi havas en la manoj freŝan numeron de **La Ponto** kun diverstemaj artikoloj. La dua parto de la fama letero de Zamenhof al la franco Michaux, en kiu la majstro klare parolas pri la interna lukto inter sia judeco kaj homaraneco, kiu fakte fontis el sia kompato kun siaj persekutataj samgentanoj. La interna ideo – justeco, respekto kaj samrajteco por ĉiuj popoloj – estis la celo de lia strebado kaj do nedisigebla parto de esperantismo. Eĉ se multaj esperantoparolantoj ne ŝatas tion, la malamikoj kaj kontraŭuloj de Esperanto sentas, ke Esperanto estas pli ol lingvo. La interna ideo estas la animo kaj la motoro de nia strebado.*

Fine, post amasoj da pluvo, la somero estas en la lando. La infanoj travivis kaj espereble bone transvivis la periodon de la ekzamenoj aŭ testoj, kiu ankaŭ por la gepatroj estas streĉa tempo, kaj nun povas ĝui la somerferiojn.

Ankaŭ al vi, karaj legantoj, ni deziras agrablajn kaj malstreĉajn feriojn. Ne forgesu sendi al ni karton kun salutoj!

Bonan kaj agrablan legadon!

Pieter Jan Doumen

Leteroj de D-ro L.L. Zamenhof (Brievan van Dr. L.L. Zamenhof)

Letero al A. Michaux de la 21.02.1905 (2)

Longan tempon en mia juneco mi estis varmega « sionisto » (tiam la sionismo ne estis ankoraŭ en modo; mi estis unu el la unuaj pioniroj de tiu ĉi ideo kaj tiam miaj sampopolanoj forte mokadis min, kiam mi kun juna flameco kaj profunda kredo paroladis al ili pri la rekonstruo de la Palestina hebrea regno). Mi laboris energie por tiu ideo, mi fondis sukcese la unuajn grupojn sionistajn. (Post 3-4 jaroj da energia laboro por la sionismo mi venis al la kon-

vinko, ke tiu ĉi ideo kondukos al nenia celo kaj tial mi forĵetis tiun ĉi ideon, kvankam en la koro ĝi restis por mi ĉiam kara, kiel agrabla se neplenumebla revo; kiam en 1897 naskiĝis la granda sionista movado aranĝita de Herzl, mi jam ne povis aliĝi al ĝi.) Sed eĉ tiam, kiam mi estis flama sionisto, mi neniam ĉesis revadi kaj laboradi por la ĉefa mia ideo (unuigo de la homaro). Mi esperis, ke, kiam mia popolo akirus iam sian antikvan hejmon kaj feliĉecon, ĝi plenumos kun sukceso tiun sian historian mision, pri kiu revis Mozeo kaj Kristo, kaj vole-nevole ĝi devos fondi popolon kaj landon idean, neŭtrale homan kun neŭtrala, sengenta lingvo kaj neŭtrale-homa filozofie-pura religio, kaj plenumiĝos la vortoj de la Biblio, ke ĉiuj popoloj venados Jeruzalemon por adoradi la unu kaj solan « Dion » kaj Jeruzalemo fariĝos la centro, kiu frate unuigos la tutan homaron...



Bialistoko: Aspektoj de la naskiĝdomo de L. L. Zamenhof

Ĉar la pli granda parto de nia popolo (precipe en Rusujo) ne uzas la lokajn lingvojn, sed parolas per aparta « ĵargono » hebrea-germana (la tiel nomata « yiddisch »), kiu ĝis nun ankoraŭ posedas nenan gramatikon, tial ke mi antaŭ longatempe dediĉis ĉirkaŭ 2 jarojn al la fundamenta esplorado de tiu ĵargono, mi esploris ĉiujn ĝiajn leĝojn kaj mi ellaboris ĝian gramatikon (kiun mi tamen neniam publikigis).

Poste mi tamen forĵetis tiun ĉi laboradon, ĉar mi opiniis, ke la vekado de la kvazaŭ-nacia patriotismo ĉe la hebreoj povus esti malutila por ili mem kaj por la ideo de la unuiĝo de la homaro.

Estis la tempo, kiam mi pensis, ke ĉiuj loĝantoj de unu lando devas peni havi unu religion kaj paroli unu lingvon. Por tiu ĉi ideo ankaŭ mi volis komenci propagandon, sed mi ĝin tre baldaŭ forĵetis, ĉar mi konvinkiĝis, ke la ideo estas nebona.

Mi ne povas rakonti al vi tute detale la tutan historion de miaj ideoj kaj celadoj, ĉar unue tio ĉi postulus de mi tro multe da tempo, kaj due ĝi estus tute neinteresa por Vi, kaj materialon por Via publika parolado ĝi ne povus doni al Vi. Mi rakontas iom nur al Vi persone, por ke Vi havu kelkan proksimuman ideon pri mia vido; sed paroli pri tio ĉi publike oni nun ne devas. Mi volas nur diri al Vi, ke, kvankam de mia plej frua infaneco en mi ĉiam superregadis la « homo », tamen pro la malfeliĉega stato de mia popolo, en mia koro ofte vekigadis la « patrioto », kiu terure bataladis en mia koro kontraŭ la « homo ». En la lastaj 10 jaroj la « homo » kaj la « patrioto » iom post iom interpaciĝis en mia koro en formo de « Hilelismo », pri kiu mi supre aludis al Vi kaj kies esencon mi kredeble publikigos post unu aŭ du jaroj. Unu libron pri la Hilelismo difinitan speciale por la rusaj hebreoj kaj verkitan en lingvo rusa mi jam publikigis (sub la tre sekreta pseŭdonimo « Homo sum ») antaŭ 4 jaroj; sed pri tiu ĉi libro preskaŭ neniu scias, ĉar mi sendis ĝin al neniu gazeto kaj nur cirkuligis ĝin kiel « ballon d'essai »¹ inter negranda nombro da inteligentaj hebreoj. La opinio, kiun mi aŭdis pri tiu ĉi libro, servos al mi kiel sperto por la venonta definitiva formigo de mia ideo, kiun mi intencas post kelkaj jaroj prezenti al la inteligentuloj de ĉiuj nacioj kaj religioj.

El la kelkaj ekzemploj, kiujn mi donis al Vi, Vi vidas, ke la historio de miaj ideoj tute ne povus servi kiel temo por Via publika parolado. Tiam mi silentos pri ili kaj mi donos al Vi nur kelkajn sekajn datojn el mia biografio. (Tiajn ĉi datojn mi donas al Vi ne kiel publikigotan leteron, sed nur private, kiel materialon; prenu el ili nur tion, kion Vi trovos utila.)

Mi naskiĝis en Bialystok la 15-an de Decembro 1859. Mia patro [kiu ankoraŭ vivas] kaj avo estis instruistoj de lingvoj. La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto en la

mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukata, t.e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn kaj en la 10-a jaro de mia vivo mi skribis 5-aktan tragedion). Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesadis min ĉiam pli teorie ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzerciĝadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj, sed ne per la buŝo, tial mi libere parolas nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane), la lingvon francan mi legas libere sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj teorie.



En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagis per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en mi nur senrajtan fremdulon (malgraŭ ke mi kaj miaj avoj kaj praavoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando); mi vidis, ke ankaŭ ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en mia urbo sin reciproke ĉiuj malamas kaj persekutas... kaj mi multe suferis de tio ĉi, kaj mi komencis revadi pri tia feliĉa tempo, kiam malaperos ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj plenrajte al ĉiuj siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkomprenos kaj ekamos unuj la aliajn.

En la jaro 1869 mi eniris en la Bialystokan realan gimnazion; sed post du monatoj mi devis eliri pro grava malsano (en mia infaneco mi tre ofte estadis malsana); en 1870 mi eniris denove kaj mi lernis kun grandaj sukcesoj (mi devas rimarki, ke en la tuta 9-jara daŭro de mia

¹ Francaĵo por “provbalo”.

gimnazia lernado, kiel en Bialystok, tiel poste en Varsovio, mi estis ĉiam la unua en mia klaso; la instruantoj rigardadis min kiel treege kapablan kaj miaj kolegoj profetadis [sen ia envio, sed tre bondezire, ĉar neniam mi havis inter la kolegoj ian malamikon], ke mi havos en la vivo ĉiam la plej grandajn sukcesojn; tio ĉi tamen poste tute ne plenumiĝis kaj mi longe devis batali ĝis mi ellaboris al mia familio modestan panon.) En 1873 miaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, kie mia patro ricevis la oficon de instruisto de la germana lingvo en la reala gimnazio. Mi restis 5 monatojn dome por lerni la lingvojn latinan kaj grekan, kaj post tio mi eniris en la Varsovian 2-an filologian gimnazion, kiun mi finis en la jaro 1879. Tiam mi forveturis Moskvon kaj eniris tie en la medicinan fakultaton de la tiea universitato.

(*Daŭrigota*)

La donaco de Gordon Brown

(*Het geschenk van Gordon Brown*)

La brita ĉefministro Gordon Brown volas « donaci » al la mondo la lingvon pri kiu Churchill diris, ke ĝi estas la « plej facile fuŝparolebla » kaj pri kiu Gandhi plendis: « Pli ol la duono de nia tempo estis dediĉita al la lernado de la angla, al la mastrado de la arbitraj ortografio kaj la prononco. Estis doloriga malkovro ke ni devis lerni lingvon kiu ne estas prononcata kiel ĝi estas skribata. »



La brita ĉefministro asertis, ke unu miliardo da homoj parolas ĝin en la tuta mondo, kio estas granda troigo. Li ankaŭ tre bone scias, ke nur la denaskaj parolantoj de la angla plene uzas ĝiajn lingvajn rimedojn, dum la granda plimulto de la homoj kiuj lernis ĝin kiel duan lingvon, povas uzi nur malgrandan parton da ĝi kun malbona prononco.

Pri la problemoj de la anglalingvanoj mem kun sia lingvo, la *Spelling Society* (vidu la retejon) diras, ke inter ĉiuj eŭropaj infanoj kapablaj legi sian gepatran lingvon, la anglaj estas la lastaj, je la aĝo de 15 jaroj: ĝi estas handikapiga eĉ por la angloj mem! Se por usonanoj kaj angloj la lernado de la angla, kiu estas por ili la nacia lingvo, postulas tiom da tempo, kiom da tempo, mensostreĉo kaj mono bezonas la neanglalingvaj popoloj de la mondo – t.e. pli ol 95% de la homaro laŭ statistikoj de la CIA – por atingi malpli altan nivelon en tiu lingvo, de kiu ekzistas 38 agnoskitaj variantoj?

La multaj politikistoj, intelektuloj, ĵurnalistoj, radio- kaj televid-animantoj, industriistoj, al kiuj ne mankis la monrimedoj kaj facilajoj por funde lerni ĝin, sentas sin malsuperaj, kiam ili uzas ĝin kontraŭ denaskaj anglaparlantoj. Tamen la iama franca ministro pri Nacia Edukado kaj la nuna ministrino pri Esplorado kaj Supera Instruado asertas ke la angla ne plu estas konderenda kiel fremda lingvo!

(*Henri Masson*)

La eŭropaj elektoj

(*De Europese verkiezingen*)

La franca partio EDE (Eŭropo, Demokratio, Esperanto), memkompreneble fondita de francaj esperantistoj, ankaŭ ĉi-jare partoprenis en la eŭropaj elektoj. Ĝi okupis la 16-an lokon inter 39 listoj kun 29.263 voĉojn (0,17%), t.e. 4196 pli ol en 2004, kiam ĝi partoprenis unufoje. Ĝia ambicio ne estas konkeri sidejojn en la parlamento, sed « kontraŭe per la elektoj atentigi la eŭropanojn pri Esperanto, » deklaras Bert Schuman, kapo de la listo. « Nia programo baziĝas sur kvar proponoj, el kiuj la plej grava estas demokratigi la internacian komunumon helpe de lingvo internacia justa kaj alirebla por ĉiuj, kiu estas Esperanto. Ni volas, ke la eŭropanoj povu kompreni sin reciproke, organizi sin kaj aŭdigi siajn voĉojn. La angla ne taŭgas por internacia komunikado malgraŭ la miliardoj da eŭroj da subteno kaj la sistemo de ĝia lernado ekde la infaneco. »

Aliaj celoj estas: konservi la lingvan diversecon, faciligi la moveblecon kaj interŝanĝojn kaj ĉesigi la lingvan diskriminacion en la eŭropaj institucioj.

La germana sekcio de EDE ricevis en sume 11.859 voĉojn. Ĝi ne sukcesis atingi la necesan kvanton da voĉoj por ricevi ŝtatan subtenon estontece. Por tio necesis duona procento, sed la partio atingis nur dekonon de tio.

Laŭ mesaĝo de Georgo Handzlik lia edzino, Maĝorzata Handzlik, kandidatino de la granda pola partio Civitana Platformo, estis reelektita. Sed laŭ mesaĝo kiun li ricevis de Zlatko Tišlar de Slovenio, Ljudmila Novak bedaŭrinde ne estis reelektita.

Niajn gratulojn al Maĝorzata! Se vi volas gratuli ŝin, vi povas fari tion per ŝia adreso: mhandzlik@europarl.eu.int.



Ankaŭ en Belgio kaj Nederlando oni klopodas starigi sekcion de EDE. Oni serĉas personojn kiuj volas kunlabori. Aŭdigi nian voĉon tra Eŭropo estas grava afero. Se tio interesas vin, konsultu la retejon de EDE.

(Laŭ mesaĝoj de Henri Masson)

270 esperantaj muzikaj albumoj

(270 muzikalbums in het Esperanto)

Dum la pasintaj 40 jaroj eldoniĝis almenaŭ 270 muzikalbomoj kun Esperanto-kantado. La statistiko montras daŭran kreskon. En la sesdekaj jaroj aperis ĉ. 4 albumoj, en la sepdekaj ĉ. 17, en la okdekaj ĉ. 58, en la naŭdekaj ĉ. 75 kaj en la unua jardeko de la 21-a jarcento ĝis proksimume decembro 2007 ĉ. 105 (dum 8 jaroj). Alimaniere dirite, ekde 1977 ĉiujare eldoniĝis almenaŭ unu albumo, ekde 1987 almenaŭ kvar, ekde 1996 almenaŭ ok.

La maksimumon oni atingis en la jaro 2001, kiam aperis escepte multaj albumoj, nome 27. Laŭ la kvanto sekvas 2004 kun 16 albumoj kaj 2000 kun 14. Ekde tiam okazis ioma malkresko al ĉ. 8 albumoj ĉiujare. Plej verŝajne tio estis sekvo de la pli vasta uzado de mp-formataj dosieroj.

La eldonado montras la kreskon de Esperantujo dum la jardekoj kun pli kaj pli grandaj kaj multaj junularaj kaj eksjunularaj renkontiĝoj, kun pli da denaskuloj kaj aranĝoj por ili, pli da Esperanto-aktivado en la interreto.

La liston de tiuj preskaŭ 300 muzikalbomoj mi metis en vikipedio ĉe <http://eo.wikipedia.org/wiki/esperanto-muzikalbomoj>, korektis kaj eldonis. Ĉe kelkaj titoloj plu mankas iuj indikoj, aliaj titoloj eble tute mankas.

Lu Wunsch-Rolshoven
lu.esperanto@gmx.de

Propono de UEA al kvar gravaj landoj (*Voorstel van de EWB aan vier belangrijke landen*)

La 16-an de junio okazis en la rusa urbo Jekatarinburgo la unua pintkunveno de Brazilo, Rusio, La Hinda Unio kaj Ĉinio. Tiuj kvar landoj intencas kunlabori pli intense kaj elpaŝi kune en la monda politiko. En Jekatarinburgo, kie la ĉefa temo estis la nuna ekonomia krizo en la mondo, renkontiĝis la ŝtatestroj Dmitrij Medvedev de Rusio, Luiz Inacio Lula da Silva de Brazilo, Hu Jintao de Ĉinio kaj la hinda ĉefministro Manmohan Singh.

Post la kunveno la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta, skribis leteron al la kvar gvidantoj, karakterizante la eventon kiel historian kaj jene komentante la temon de la kunveno: « Ekonomia krizo okazigita alilande trafas viajn landajn grave, ne nur pro la nekredeblaj riskoj kaj ŝuldoj alprenitaj en Usono, sed ankaŭ pro la fakto, ke la valuto de nur unu lando rolas kiel internacia valuto ».

Li samtempe faris jenan gravan proponon: « Universala Esperanto-Asocio proponas al vi la ideon, ke valutoj kaj lingvoj funkcias sammaniere. La internacia uzo de la angla plifortigas nur kelkajn privilegiitajn landojn kaj samtempe starigas riskojn kaj kostojn por ĉiuj aliaj. Ĉu tiaj privilegioj, valutaj kaj lingvaj, kondukis nin al pli bona mondo? Ĉu la kostoj estis efikaj? Certe ne.

« Viaj kvar landoj estas promesaj landaj por la estonteco. Sed vi, kiel ni tra la tuta mondo, devas ĉesigi la valutajn kaj lingvajn privilegiojn, se oni volas progresi rapide, malpli koste kaj harmonie. Pri nova valuta sistemo vi jam havas ideojn kaj proponojn. Por nova lingva sistemo ni proponas Esperanton kiel efikan, pragmatan kaj malpli kostan solvon. »

La letero de prof. Dasgupto estis sendita al ĉiu ricevonta en ties propra lingvo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Novajoj el Esperantolando

(Nieuw uit Esperantoland)

Belgio 1. – *Partopreno en la UK de Bjalistoko.*

– Tri membroj de la Limburga Esperanto-Asocio partoprenos en la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, kiu okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto pri la temo « Krei pacon ponton inter la popoloj : Zamenhof hodiaŭ. » Temas pri la prezidanto de LEA Henri Schutters, la sekretario Pieter Jan Doumen kaj la kasisto Rik Leijskens. Ili faros

la vojaĝon aviadile kaj jam forflugos la 24-an de julio al Varsovio por viziti la tombon de Zamenhof kaj la iomete esplori la urbon. La sekvantan matenon ili trajnos al Bjalistoko, kie ili restados en la Hotelo Golebiewski.

Ĝis la 29-an de junio inkluzive oni nombris 1750 partoprenontojn el 61 landoj.

Eble ankoraŭ aliaj membroj de LEA iros tien, sed pri tio ni ricevis nenian informon.



Ni deziras al ĉiuj partoprenontoj fruktdonan kongreson kaj agrablan restadon en la naskiĝ-urbo kaj lando de D-ro Zamenhof.

Pieter Jan Doumen

Belgio 2. – *Esperantoforumo* – Antaŭ nelonge la Flandra Esperanto-Ligo startigis forumon sur la interreto, en kiu ĉiuj esperantoparolantoj kaj simpatiantoj rajtas partopreni.

Volonte mi disponigas mian disponeblan spacon por la forumo. La granda avantaĝo estas, ke tiel ni ne dependas de reklamo aŭ aliaj nedezirataj intervenoj, kaj ke homoj povos meti siajn demandojn, petojn, problemojn kaj komunikojn en specialan keston, kie ĉiuj aliĝintoj povos legi tiujn mesaĝojn kaj eventuale reagi al ili. Kontraŭe al la klasikaj pasivaj retejoj, en forumo povas ekesti interagado inter petantoj kaj ofertantoj de ĉianivelaj informoj. Lode Van de Velde, prezidanto de FEL, esperas tiel povi krei novan dinamismon en la flandra Esperanto-pejzaĝo kaj aliloke. Sed por ke forumo povu bone funkcii, estas bezonata aktiva partopreno en ĝi de tiom da homoj kiom eble.

Jen la retejo: <http://esperanto-forum.net>.

Kiel aŭtoro kaj administranto de la retejo mi volonte akompanos vin paŝon post paŝo unue tra la registropcedo kaj poste ĉe la malfermado kaj la respondado de mesaĝoj.

Albert Claesen
retejestro@espero-hom.net

Nederlando. – *Pasporta Servo denove funkcias!* – Ni ĝojas, ke ni povas prezenti al vi la aliĝsistemon de la nova Pasporta Servo ! Post plurmonata dura laboro la PS-teamo ĵus sukcesis finprepari la aliĝsistemon de la nova retpaĝo <http://www.pasportaservo.org> kaj por la unua fojo ni petas plenumi, anstataŭ la ĝis nun kutima papera aliĝilo, la tute novan retan aliĝilon. La reta aliĝo plenumas la saman funkcion: vi aperos kiel gastiganto de Pasporta Servo en la PS-libreto, kaj en la nova retpaĝo. Simple iru al tiu retpaĝo kaj alklaku **Membriĝi** supre sur la paĝo. Post plenumo de la kampoj kaj akcepto de la uzokondiĉoj, vi ricevos pasvorton en via retpoŝto. Per tiu pasvorto vi povas eniri la paĝaron kaj poste aldoni detalojn pri gastigado. Ne forgesu eniri la paĝon post ricevo de la pasvorto kaj tie aldoni la gastigo-detalojn, ĉar alikaze neniu povos kontakti vin por gastigo!

Se vi volas aliĝi kiel gastiganto, sed preferas paperan aliĝilon, turni vin al la Centra Oficejo de TEJO/UEA, Nieuw Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Vi povas eĉ aliĝi per telefono! Simple alvoku la Centran Oficejon kaj petu la TEJO-oficejon dum la ofichoroj, lunde-vendrede de la 9-a ĝis la 16-a, tel. +31 10 43 6 1044.

Joop Kieft, PS-komisiito,
(Ret-info Eventoj, Hungario)



Hungario 1. – *Alvoko de Katalin Kováts.*

Nia retejo devas urĝe esti transkonstruita, kaj por tio ni bezonas vian financon helpon. Edukado.net estas en danĝero. Pro financaj kialoj fariĝas pli kaj pli malfacile pagi la kostojn de la funkciigo de edukado.net, kaj tute ne eblas modernigi aŭ plukonstrui la paĝaron. Transigi ĝin al alia esperantista servilo pro kopi- kaj posedrajtoj ne eblas. Estas granda risko, ke edukado.net devos fermiĝi kaj ke perdiĝos ĉio kion ĝi nun havas.

Tamen estas eblo savi ĝin, se ni sukcesos kolekti la necesan sumon por transporti ĝin kaj forlasi la multekostan nederlandan servilon kaj entreprenon, kunlabore kun E@I metante ĝin en la manojn de esperantistoj. La transkonstruo estus bona okazo ankaŭ por modernigo kaj simpligo, rearanĝo de la nun jam ekstreme granda kaj malfacile travidebla materialo. Por konstrui modernan kaj plene funkciantan paĝaron necesas 35 mil eŭroj. Por konstrui ĝin tiel, ke ĝi povu ekfunkcii kun la bazaj servoj, tio kostos 25 mil eŭrojn. Por la rekonstruo de www.edukado.net ni serĉas subtenantojn. Jen kiujn ni jam trovis: nia ĉefsponsoro, Tamás Slezák, direktoro de la entrepreno Plastenergo (Hungario), pretas helpi la rekonstruon per 10 mil eŭroj. Li ankaŭ pretas prunti kelkmil eŭrojn por 2-3-jara repagperiodo, se tio estos garantiita. Ni prezentis helpopeton ankaŭ al la Instituto Hodler '68, kiu aljuĝis subtensumon de 2000 eŭroj, kaj al la fondaĵo Fame, de kiu ni ankoraŭ ne ricevis respondon.

En la lastaj 5 jaroj la ekzercoj de la Lerniloteko estis elŝutitaj ĝis nun 97.895 fojojn. Se ĉiu elŝuto kostintus 0,35 eŭrojn, ni havus la necesan sumon por la moderna paĝaro. Ni havas ĉ. 1900 membrojn. Se ĉiu membro donacis 15 eŭrojn, ni havus la necesan sumon. Ni konscias, ke ne ĉiu uzanto povas pagi por la servoj: ne ĉiu povas permesi al si subteni nin. Sed verŝajne multaj jes ja povus rekompencian laboron kaj helpi gardi ties rezultojn. Jen, kaptu la okazon kunlabori en unu el la plej grandaj edukprojektoj de nia movado. Antaŭdankon pro ĉies helpo.

Klarigo pri la pagmaniero troveblas en :
<http://www.edukado.net/pagina/Subtenu+nin!/14097/#22745>

Katalin Kováts, redaktoro

Hungario 2. – *Esperanto malaperas el budapeŝta universitato.* – La mondfama Esperanto-fako ĉe la ĉefa budapeŝta universitato ELTE malaperas. Jam antaŭ kelkaj jaroj oni ĉesis akcepti studentojn, kaj la lastaj du nun okupiĝas pri siaj diplomlaboroj. La usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) faris provon savi la Esperanto-fakon, proponante financan subtenon, sed la internaj konfliktoj de la hungara Esperanto-movado malebligis konstruan aliron.

Ekde la jaro 1966 la Katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko de la budapeŝta universi-



tato ELTE funkciis altnivela Esperanto-fako. Esperanton oni povis studi ne kiel ĉeffakon, sed kiel la unuan kromfakon. Unu el la ĉefaj motoroj de la Esperanto-fako ekde 1966 ĝis sia morto en 1987 estis István Szerdahelyi. En la budapeŝta Esperanto-fako studis multaj Esperanto-aktivuloj, sed ankaŭ alilandanoj. Post la falo de komunismo en Hungario falis ankaŭ la prestiĝo de Esperanto kaj la ĝenerala interesiĝo. Samtempe la financado de la universitato estis striktigita, kaj antaŭ kelkaj jaroj la akceptado de novaj studentoj por la Esperanto-fako estis ĉesigita. Dum kelkaj jaroj la nombro de studentoj en ELTE trioniĝis al malpli ol 10.000, kaj por ŝpari mono oni decidis devige pensiigi ĉiujn instruistojn de pli ol 62 jaroj. Inter tiuj estis ankaŭ kelkaj lekciistoj de la Esperanto-fako, i.a. Iván Bujdosó, kiu iĝis 62-jara en 2006. Lia maldungo signifis ankaŭ, ke la universitato rezignis pri planoj transformi la malnovan, universitatnivelan Esperanto-fakon en novan, malpli ampleksan lingvoinstruadan programon, kiu tamen ebligis al la studentoj ankaŭ estontece havi kursojn pri Esperanto kiel parton de sia universitata eduko. Ĉar la oficiala kialo por la maldungo estis manko de mono, ESF serioze konsideris kontribui al la salajrokostoj, kaj en 2007 prof. Humphrey Tonkin kiel reprezentanto de ESF persone vizitis la universitaton por pridiskuti la praktikajn detalojn. Sed la dekanato de la katedro tute rifuzis renkonti lin, kaj la rektoro de la universitato ne konsentis subskribi kontrakton pri la financa subteno.

En la sama periodo kulminis la interna skismo de la Esperanto-movado en Hungario. La prezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio akuzis la antaŭan prezidanton pri financaj misagoj, kaj la tuta hungara movado disfalis en du batalantajn frakciojn. Sendube la skismo ankaŭ malaltigis la jam nealtan prestiĝon de Esperanto en la okuloj de la universitata estraro, kaj do rekte kontribuis al la fina malapero de Esperanto de la programo.

Intertempe la polica esplorado estas finita: financaj misagoj ne estis trovitaj, kaj la nova estraro de HEA publike petis pardonon al la senkulpe akuzita eksprezidanto. Tamen la skismo ne malaperis, kaj restas nun nur du studentoj en la iam elstara Esperanto-fako.

(Eventoj, Budapeŝto)

Francio. – *Kanzonteksto en Esperantotraduko.* – Per artikolo titolita « Kanzonteksto de Patricia Kaas tradukita en Esperanton », Francis Soghomonian atentigis en la revuo **Libera Folio** pri la fakto, ke « la oficiala retejo de la franca kantistino enhavas 39 tradukojn de la kanzono per kiu ŝi reprezentos Francujon en la 54-a Eŭrovida Kanzonkonkurso en Moskvo la 16-an de majo 2009. Esperanto estas unu el la malmultaj lingvoj kun kompleta teksto. <http://www.patriciaakaas.net/eurovision2009/> (alklaku LES PAROLES) »

Plej miriga (kaj salutinda) estas la elekto de Esperanto kiel lingvo en kiun la teksto ankaŭ estas tradukita, kvankam ĝi estas oficiala lingvo de neniu lando: iom post iom la bildo de nia lingvo ŝanĝiĝas ĉe la ĝenerala publiko...

Ankaŭ Dennis Keefe, nun en Ĉinio, redaktis artikolon sub la titolo « Patricia Kaas povas helpi popularigi Esperanton » por inviti al subteno de tiu iniciato kaj proponi strategion kaj bonajn ideojn tiucele.

Henri Masson

Brazilo. – *Kial esperantistoj preskaŭ ne aĉetas librojn?* – Dum la 73-a Esperanto-Renkonto de la Paraĭba Valo oni debatis pri la temo « Kial esperantistoj preskaŭ ne aĉetas librojn? » La debato daŭris pli ol horon. Post 10-minutaj paroladetoj de kvar homoj intervenis ĉeestantoj. Jen la resumo:

Neaĉetado de libroj ne estas fenomeno nur en la Esperanto-movado. Eĉ homoj kiuj frekventas kursojn de fremdaj lingvoj, post la kurso malofte aĉetas librojn en la lernitaj lingvoj.

Unu preleganto emfaze insistis, ke ne estas problemo de aĉetado, sed de legado kaj kulturo. Se oni ne instruas en la familioj kaj la lernejoj, ke legado estas esenca kutimo por kleriĝo, tiam infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj ne akiras tiun kutimon.

Interreto kaj televido kompreneble iom malhelpas aĉetadon kaj legadon de libroj pro la troa temporabo. Aliflanke homo tre malofte legas longajn tekstojn sur ekrano de komputilo. La kulturo perata de tiuj rimedoj estas ofte pli supraĵa, ol tiu kiun peras libroj.

Diabla cirklo formiĝas pro la nesufiĉa komercado de libroj en Esperanto. Oni ne facile povas aĉeti esperantajn librojn, ĉar ili ne estas facile haveblaj. Ĉar oni malmulte aĉetas ilin, oni malfacile povas intensigi la disponigadon de la varo. Krome, por brazilanoj libroj el Eŭropo estas tro multekostaj.

La plej grava punkto pri kiu ĉiuj debatantoj konsentis: por intensigi la aĉetadon kaj legadon de libroj en Esperanto, necesas urĝe plibonigi la lingvonivelon de la esperantistaro. Por tio estus bonvenaj facilaj tekstoj. Sed ĉefe gravas, ke la esperantistoj mem decidu, ke ili ne restu eternaj komencantoj.

Oni menciis la fakton, ke ne ĉiam esperantaj eldonejoj publikigas librojn kiujn la plej multaj esperantistoj deziras legi. Estus interese esplori pri la tipo de literaturo, kiu plej ofte plaĉas al Esperanta publiko.

Fine oni aludis pri la eblecoj de novteknologiaj libroj: sonlibroj kaj libroj legeblaj per porteblaj komputiletoj.

Paulo Sérgio Viana

Germanio. – *Internaciaj interparoladoj en Bochum.* – En Bochum, Germanio, okazis la 6-a renkontiĝo de esperantistoj el Essen kaj sud-orienta Brabanto. Ĉi tiun tagon, la 16-an de majo, partoprenis 14 homoj, inter kiuj estis germanoj, 2 belgoj, 1 franco kaj 3 nederlandanoj. La programo ekis en la moderna urba arkivo de Bochum, kie oni eklernis pri la urbo. Ĉiĉerono gvidis nin laŭlonge de diversaj pentraĵoj, bildoj kaj objektoj, kiuj prezentas la pasintecon de la urbon. Dume Petra Dückersdorf tradukis perfekte al Esperanto.



Post la pikniko estis tempo por la Placo de la Eŭropaj Promesoj. En la tiea Kristo-preĝejo troviĝas, ekde 1931, listo de nomoj de multaj « herojoj » el la Unua Mondmilito apud listo de

nomoj de la tiamaj « malamikaj » landoj. Kiel reago al ĉi tiu listo artisto Jochen Herz komencis produkti por la Eŭropa Kultura Ĉefurbo Ruhr 2010 listegon de nomoj de vivantoj. Subtenantoj skribas pozitivan promeson por Eŭropo, kaj iliaj nomoj aperos sur grandaj memorŝtonoj en la pavimo de la rekonstruota placo. Jochen Gerz klarigas: « Eŭropo devas paroli ne per unu voĉo, sed per multaj. Toleremo havas multajn. » Teksto vibriganta kordon ĉe la Esperantistoj, ĉu ne? Se vi volas partopreni, konsultu http://www.pev2010.eu/web_de/index.html.

Sekvis promenado tra parkon apud la urbo-centro de Bochum abundantan per grandaj arboj kaj florantaj rododendroj al agrabla trinkejo, kie oni babilis en amika etoso. La saman etoson ni daŭrigis en itala mangejo. Ni dankas al ĉiuj partoprenintoj pro ĉi tiu bela tago kaj speciala al Petra Dückersdorf kaj Ludger Schméink, kiuj ĉion organizis. Ankaŭ por komencantoj la tago en Bochum estis stimula por interparoli multe en Esperanto.

Esperable la amikeco daŭros ĝis la transformiĝontejo... Se vi volas scii, kion signifas ĉi tiu vorto, tiam nepre venu al la sepa renkontiĝo en la regiono Helmond-Eindhoven, okazante en septembro. Kontakto Twan Gremmen por antaŭ-aligo per la retadreso info@twangremmen.nl aŭ telefonu al numero 0(031) 492-544472.

*Twan Gremmen, An Olijslagers,
kaj Ralph Schmeits*

Rakonto (verhaal)

De kie venas la kiskidioj ?

(Vanwaar komen de Kiskidiërs ?)

(sekvo) – (Vervolg)

Richard volonte ekscius, kiuj estas tiuj kiskidioj, sed ne kuraĝus ĝeni siajn gepatrojn, kiuj estis laborantaj sufiĉe malproksime de la ranĉo. Tial li konsultis la librojn de sia patro, kiuj troviĝis en ligna kesto en la dormoĉambro de liaj gepatroj. Ne ekzistis lernejoj en la regiono. Tial lia patro instruis al li legadon, skribadon, kalkuladon kaj iom da historio kaj geografio en la dimanĉoj, kiam li havis tempon, ĉar li ne volis, ke lia filo estu analfabeto kiel preskaŭ ĉiuj aliaj infanoj tiutempe kaj tiuloke. Richard do scipovus legi, sed nur malrapide kaj kun peno, ofte literumante la vortojn. Sekve li dediĉis multan tempon al sia serĉado. Sed rilate al tiuj misteraj kiskidioj, li trovis nenian spuron! Konsternite, li konkludis, ke devas temi pri ia afrika tribo, ĉar pri Afriko oni ankoraŭ ne sciis tre multe.

« Sendube ili estas afrikanoj, sed eble ne negroj, ĉar alie la patro de Tommy estus dirinta negrojn anstataŭ kiskidioj, » li diris al si mem.

Iam, antaŭ tre longe, trapasante ian urbon en la Oriento, li vidis afrikan negron. Li memoris, kiel li tiam teruriĝis pro ties stranga aspekto. Sed la afrikano, vidante tion, afable ridis al li, nudigante du vicojn da belaj blankaj dentoj. Richard tuj trankviliĝis.

Sed lia scivolemo estis tro granda por entrepreni nenion plu rilate la kiskidiojn. Kvankam la patrino diris al li, ke li ne povas forlasi la ranĉon, la deziro vidi tiujn strangajn homojn estis tiel forta, ke li ne povis rezisti ĝin, kaj malobeis la patrino, riskante esti punita pro tio. Li do selis sian poneon kaj ekrajdis al la Nigraj Rokoj apud la rivero, serĉante la kampadejon de la kiskidioj.

Post kelkaj mejloj da rajdado, li ekvidis la riveron, kiu kvazaŭ larĝa malhelblua rubando serpentumis tra la ebena pejzaĝo. Li sekvis la riveron ĝis la Nigraj Rokoj, kiuj staris solecaj en la ebenaĵo apud arbareto. Kelkan tempon poste li ekvidis la vagonojn de la karavano, metitajn en la kutiman rondon. Karavanoj ofte estis atakataj de indianoj aŭ rabistbandoj, kaj tiu aranĝo permesis la plej efikan defendon. Li saltis de sia ĉevalo, sukcesis proksimiĝi piede al la tendoĉaroj sen esti vidata, kaŝis sin malantaŭ ia arbusto je dudeko da jardoj de la rondo kaj atente rigardis. Interne de la cirklo staris virinoj ĉe fajro. Ili verŝajne estis kuirantaj la manĝon por la tuta grupo, laŭte parolante kaj ridante inter si, sed estis tro malproksime por kompreni ion ajn. Tuj apude iuj viroj okupiĝis pri la kontrolo de siaj pafiloj. Infanoj ludis kaj gaje kuris tien kaj reen. Nur ili ne estis nigraj, sed vere blankaj, kvankam forte sunbrunigitaj, kaj aspektis tute normalaj kaj pacamaj.

« Eble ili venas el centra Eŭropo aŭ el Ruslando, » li observis.

Lia scivolemo kreskis. Tial li iris ankoraŭ pli proksimen kaj kaŝis sin malantaŭ iun vagonon. Eble de tiu loko li povus aŭdi, kion diras la kiskidioj.

Apenaŭ li ekokupis sian novan pozicion, li sentis fortan manon sur sia ŝultro. Li preskaŭ morte teruriĝis. Forta skuo trakuris lian korpon de la kapo ĝis la piedoj. Rapide li turnis la kapon kaj rigardis en la ridantan vizaĝon de viro, kiu sendube estis kiskidio, ĉar li havis brunan haŭton, nigran barbon, nealtan staturon kaj masivan korpon.

« Qu'est-ce que tu fais là, mon petit ? (Kion vi faras tie, knabo?) » la viro afable demandis per forta kaj profunda basvoĉo.

Richard estis agrable surprizita, kiam li aŭdis, ke la viro parolas la lingvon de lia patrino. La kiskidioj do verŝajne apartenis al la popolo de lia patrino. Li tuj rekvietiĝis kaj respondis:

« Rien, monsieur, je regarde seulement (Nenion, sinjoro, mi nur rigardas). »

Richard ja parolis ankaŭ la francan lingvon, kiun ĝis nun li parolis nur kun sia patrino kaj neniam aŭdis el alia buŝo ol la ŝia. Aŭdi tiun ĉi viron paroli la saman lingvon kiel lia patrino, estis stranga sperto por li, ĉar kiel infano li nekonscie ĉiam kredis, ke lia patrino havas specialan lingvon por si sola.

La viro estis same tiel surprizita kiel la knabo, kiam li aŭdis lin paroli france sen ia fremda akĉento.

« Kiel fariĝas, ke vi parolas france meze en lando kie ĉiuj parolas nur angle ? » li demandis franclingve.

« Mia patrino estas francino, sinjoro. »

« Kia hazardo, Dio mia, renkonti etan francon tuj en la mezo de Usono, » li diris, skuante la kapon de miro, kvazaŭ li ne povis kredi siajn orelojn.

« Kiel vi nomiĝas ? »

« Mi nomiĝas Richard Barlow, » li diris, prononcante 'Ríĉid' laŭ la angla maniero, « sed mia patrino ĉiam nomas min 'Riŝár', ĉar tio estis la nomo de ŝia patro, ŝi diras. »

« Certe estas tiel. Mi estas Pierre Legrand. Mi ĝojas konatiĝi kun vi. » Kaj la viro prenis la dekstran manon de Richard kaj forte skuis ĝin.

« Mi ankaŭ ĝojas, » respondis Richard, sed ne tiel entuziasme, kiel la franco estus atendinta.

« Sed vi ŝajnas al mi iomete seniluziigita, ĉu ne? Kial do? Kion do vi atendis? »

« Mi ne sias. Estas nur, ke amiko mia faris al mi ŝercon. »

« Kion do li faris ? » demandis la franco, ne komprenante la rilaton inter si kaj la serĉo.

« Li diris al mi, ke vi estas kiskidioj. »

Intertempe ambaŭ estis alvenintaj en la vagonarrondo, ĉar Pierre volis prezenti sian novan amiketon al siaj gekompanoj. Ĉiuj aŭdis la lastan frazon de Richard kaj laŭte ekridegis. Richard ne komprenis, kial ili ridis, kaj demandis, iomete incitite:

« Kion priridindan mi diris ? »

Juna viro kun ankoraŭ maldensa barbo respondis, ne atentante la demando de Richard :

« Via amiko tute pravas: ni efektive estas kiskidioj. »

« Sed vi parolas la lingvon de mia patrino, kaj ŝi parolas france. Vi do verŝajne estas francoj. »

« Venigu ŝin, » diris juna virino, ignorante la rezonadon de Richard. « Ŝi estos kontenta renkonti samlandanojn kaj samlandaninojn. Ŝi jesigos, ke ni estas kiskidioj, tute kiel ŝi. »

« Mi kredas vin. »

« Kaj koncerne la nomon kiskidioj, ne maltrankviliĝu pro ĝi, » daŭrigis la junulino. « Nur la usonanoj nomas nin tiel. »

« Sed kial do ? »

« Nu, tio estas tre simpla: la usonanoj ne parolas france, aliflanke nur malmultaj el ni parolas angle, kaj ankoraŭ fuŝe. Kiam do iu el ni parolas angle kun usonano, la aliaj kiuj ne komprenas, kio estas dirata, ĉirkaŭas lin kaj demandas: 'Qu'est-ce qu'il dit? (Kion li diras?)' Malĝuste prononcata, tio sonas kiel 'kiskidi'. De tie nia kromnomo! »

Richard kore ridis pri la simpla ekspliko kaj devis premi la manon al ĉiuj 'kiskidioj'. Post tio li rapidis hejmen por venigi siaj gepatrojn. Sed ankaŭ multaj aliaj loĝantoj de la regiono, informitaj de Tommy kaj dezirantaj vidi kaj aŭdi la strangajn kiskidiojn, venis al la Nigraj Roko.

Tiun vesperon la rivero Missouri, eble unuafoje en sia longa ekzisto, aŭdis la laŭtajn ĝojkriojn akompanantajn la malnovajn francajn kanzonojn kaj dancojn, kiuj la kiskidioj plenumis ĉirkaŭ agrabla kampadeja fajro. Precipe la patrino de Richard estis tre feliĉa konatiĝi kaj paroli kun gesamlandanoj. Plenkore ŝi kantadis kaj dancadis kune kun ili.

Poste ankaŭ la anglalingvaj usonanoj kantadis kaj dancadis. Estis vera amuza interfratiĝo. Nur interparoli ili ne povis. Sed ĉar ĉiuj multe bezonis homan kontakton, Richard kaj lia patrino devis nur ĉiam traduki demandojn kaj respondojn el la angla en la francan kaj inverse. Richard, kiu sentis sin heroo, neniam estis pli feliĉa.

Nur tre malfrue la angla-usonanoj reiris hejmen. Ankoraŭ longe post tiu tago ili parolis pri tiu renkontiĝo kun la gastamaj kiskidioj, kiuj jam la sekvantan matenon reprenis sian migradon okcidenten. Post longa kaj malfacila transiro trans la Rokajn Montojn ili fondis prosperan kolonion en iu fekunda kalifornia ebenaĵo, komencante tiamaniere belan, novan episodon en sia historio.

Trad. P. J. Doumen

Serĉo (mop)

- Kio? Tiom da mono por eltiri nur unu denton, kiu estas eĉ ne sana, sed prutrinta? Tio ne estas serioza: via tarifo esta tro alta por laboro kiu daŭras nur kelkajn minutojn!

- He, se vi trovas, ke vi ne ricevas sufiĉe por via mono, mi povas ja daŭrigi la plezuron!



Gramatikajo (*spraakkunst*)

C. (Ne)uzo de la artikolo antaŭ propraj nomoj

1. Propraj nomoj estas individuaj nomoj kiuj sufiĉas por plene distingi iun aŭ ion disde ĉiuj aliaj de la sama speco. Tial antaŭ ili oni ne uzas la artikolon.

Belgio estas lando en Eŭropo.

Hago kaj Roterdamo kuŝas en Nederlando.

Rejno kaj Danubo fontas en Svisio.

2. Tiovalidas ankaŭ por pluralaj geografiaj nomoj kiuj estas sentataj kiel unuo; pluralaj familiaj nomoj alprenas la artikolon.

Alpoj kaj Pirineoj estas montaroj.

Bermudoj kaj Azoroj estas insularoj.

La Habsburgoj longe regis Aŭstrion.

Ni invitis la Smit-ojn al la festo.

3. La nomojn de la sezonoj, monatoj kaj tagoj, se ne determinitajn, oni uzas sen artikolo, ĉar ili fakte estas propraj nomoj, kvankam oni malofte skribas ilin per majusklo.

en vintro, en somero

Li venos vendredon, la 10-an de julio.

4. Oni tamen uzas la artikolon

a) se komplemento akompanas propran nomon.

la ruinoj de la antikva Romo

la Italio de XIV-a jarcento

b) se komuna nomo sekvas aŭ antaŭiras ĝin.

la Norda Maro, la strato Graniczna (Z.)

la urbo Parizo, la rivero Sejno

Rim.: Tamen antaŭ propra nomo de persono antaŭirita de titolo, rango, funkcio aŭ profesio, sed sen komplemento, oni ne uzas la artikolon.

Doktoro Zamenhof kreis Esperanton.

reĝo Balduino kaj reĝino Fabiola

sinjoro Smit kaj fraŭlino Kat

la bona doktoro Zamenhof

La ĉiopova Mahadeva kreis la belegan

Hindujon (F.)

c) antaŭ kunmetitaj nomoj de institucioj, lernejoj, preĝejoj, asocioj, gazetoj ktp. kies kernvorto estas institucio, lernejo, preĝejo, asocio, gazeto ktp. Ili ne estas veraj propraj nomoj, ĉar temas pri determinitaj komunaj nomoj. Tial oni uzas la artikolon. Pri tiu uzo ekzistas granda necerteco. Tamen D-ro Zamenhof estas tre klara tiurilate kaj ekzemploj en liaj tekstoj abundas.

la Universala Vortaro (Z.)

La « Malfermitan Leteron » en l'Esperantisto

mi legis kun malagrabra surprizo(Z.).

la Komitato de la Lingvo (Z.)

la « Fundamento de Esperanto » (Z.)

la baziliko Sankta Petro

la Universala Esperanto-Asocio

la Eŭropa Unio, la Ligo sen Nomo

Rim.: Se la propra nomo ne entenas tian komunan nomon, kiu permesas klasifiki ĝin, oni ne uzas la artikolon.

Amnestio Internacio, Kuracistoj sen Limoj

Nigra Sago gajnis la ĉevalkuron.

ĉ) Ankaŭ la nomoj de veturiloj alprenas la artikolon, ĉar oni subkomprenas la vorton 'ŝipo, aviadilo, trajno' ktp.

La Elizabeto II, la Ora Birdo, la Ruĝa Sago

Ekde nun vi povos mendi vian ekzempleron de la fama flandra mezepoka bestepopeo

Renardo Vulpo

*ĉe la tradukinto Pieter Jan Doumen,
Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel,
retadreso pieter.doumen@adsl4you.be
telefonnumero 0032-(0)11-73.20.47.*

La libro enhavas 156 paĝojn.

Prezo: 15 € + sendokostoj 2,97€ por Belgio.

Analogaj sendokostoj por Nederlando



